7-a Jaro
N-ro 2 (34).

Julio 1932.
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

---

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

**Ĉu vi restos fidela?**, de Wilhelm Solzbacher. — **La Trezoro en la Rejno,** de Alois Norbert. — **Ĉu vi estas bona patrioto?**, de John Nibb, — **La amerikanaj negroj kaj la katolikoj**, laŭ « Bulletin des Missions ». — **Krucmilitista spirito**, de Leopold Bauer. — **El la historio de la slovaka katolika skolta movado**, de Alojz Macek. — **Litova katolika junularo jubileas,** de D-ro Juozas Leimonas. — **Japanujo en danĝero**, laŭ D-ro Warnshuis. — **Salado,** de Lola (Bestprotekto — Princo Faisal — Bagateloj — Kial la korko krias — Hodiaŭa Aŭstrujo — Malarmada Konferenco — Miskompreno — La Bovoj). — **Nia Movado.** — **Praktikaj Rimarkoj.** — **Regiona Kunveno de Katolikaj Esperantistoj.** — **Internacia Junulara Tendaro 1932.** — **Anoncetoj.**

REDAKCIO : **Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.**

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Presejo: imp. DISONAISE, J. Winandy, Dison. Tel. 5062.

# Abonprezoj de "La Juna Batalanto"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s 4 p | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0.50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 48037 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo: Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug).


**AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŜUROJN!**

**Mondjunularo Katolika,** kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

**Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique.** 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).

**La Jeunesse Mondiale Catholique,** kvarpaĝa varbilo en franca lingvo. 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0,70 RM).

**Die katholische Jugend lernt Esperanto.** Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

**Katholiken, lernt Esperanto!** La sama varbilo kun alia titolo. Sama prezo.

**Die Katholische Weltjugendliga.** Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga.** 16 paĝa broŝuro aperinta 1929. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.30 RM.

**Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung.** Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majlâth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.30 RM.

**Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63.**




# ĈU VI RESTOS FIDELA?

La mizero de nia tempo pelas multajn homojn al malespero. Ili perdas la kredon je la altaj idealoj, kies anoj ili estis, kaj serĉas la solvon de la problemoj en iu katastrofa sistemo. Ni donu kelkajn doloriĝajn ekzemplojn.

En la lasta jaro la Eldonejo La Juna Batalanto ricevis karton de abonanto, kiuper MOKA venis en la Esperanto-movadon, dirantan, ke li daŭrigos la Esperanto-agadon, sed ke li ne plu povas resti MOKA-ano kaj abonanto, kiu per MOKA venis en la Esperanto-movadon, dirantan, ke li daŭriloka katolika junulara unuiĝo, al kiu li apartenis, kaj ke li intencas eniri en la Komunistan Junularan Asocion. Kaj kelkajn tagojn poste ni vidis en komunista junulara gazeto artikolon subskribitan de li kaj parolantan pri la « hipokriteco » de la katolika junularo.

Simile evoluis alia amiko, kiu iam fervore kunlaboris en MOKA kaj eĉ faris ĉefparoladon en regiona Esperanto-kunveno de MOKA. Li malabonis, kaj poste ni aŭdis, ke li fariĝis komunisto.

Alian malĝojigan kazon ni devas citi. Unu el la plej fervoraj kaj plej valoraj pioniroj en la katolika Esperanto-movado antaŭ la milito estis la ĵurnalisto Josef Kral en München, kiu dum longa tempo eldonis la Germanan Eklezian Gazeton. Post la milito li estis unu el la unuaj, kiuj revivigis la movadon. Li dissendis kune kun la tiama prezidanto de « Nederlanda Katoliko » la unuan alvokon por refondo de « Espero Katolika ». Li estis unu el la fondintoj kaj la unua prezidanto de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj. Liaj libroj, speciale pri la sociala problemo, estis kuraĝaj kaj valoraj pioniraj verkoj. Pri MOKA kaj La Juna Batalanto li kelkfoje propagande atentigis en la de li redaktita gazeto « Ecclesia ». En la jaro 1927 li subskribis nian alvokon « Katolika Junularo kaj Esperanto ». Kaj nun ni ricevis la informon, ke Josef Kral — kiu cetere dum kelka tempo estis estinta prezidanto de la Bavara Centro-Partio — aliĝis al la nacisocialista partio de Hitler!

Ni ne volas kondamni tiujn iamajn samideanojn. Certe ili foriris en plej bona volo, kaj sendube ili faris en katolikaj rondoj tre doloriĝajn spertojn, kiuj puŝis ilin al tiuj katastrofpartioj, kies anoj ili nun estas. Kaj certe la ĉefa kaŭzo estis, ke la grandaj amasoj de la katolikoj, de kiuj ili atendis agadon kaj ofereman laboron, dormas kaj montriĝas nekapablaj kaj malfortaj, por plenumi siajn devojn, por realigi la socian justecon, por eviti la venontan hombuĉadon en nova milito. Ni tamen esperu, ke iam tiuj amikoj revenos!

Preskaŭ same doloriga estas la kazo de multaj aliaj, kiuj nun forkuras, ĉar ili perdis ĉiun intereson por idealaj aferoj aŭ ĉar ili perdis la kredon je la ebleco, ke katolikoj povos efike helpi, por renovigi la vizaĝon de la tero. « Mi nur plu okupiĝas pri miaj privataj aferoj », ili diras aŭ povus diri, se ili volus. Multaj centoj da tiaj homoj iam kunlaborintaj en nia movado nun staras apude, nenion farante. Nia movado estus konvinka kaj impona forto, grava faktoro en la katolika mondo, se ili estus restintaj fidelaj.

Ĉu ankaŭ vi volas foriri? Tion ni demandas al la geamikoj, kiuj nun staras ĉirkaŭ la malgranda aro da junaj batalantoj, kiuj gvidas la movadon. Aŭ ĉu vi volas helpi, ke fine ni povu fari la paŝon antaŭen, kiun ni delonge atendas, ke ni povu entrepreni grandan tutmondan krucmiliton de la katolika junularo por paco kaj internacia frateco? Kial vi restas starantaj senmove, kial vi ne varbas ĉiutage por nia granda idealo, kial vi ne helpas, por gajni katolikajn gejunulojn por nia movado, kial vi ne zorgas, ke nia modesta, sed necesa organo La Juna Batalanto tiel pligrandiĝu sian abonantaron, ke ĝi povu fariĝi pli bela, pli granda, pli efika? Nur kelkaj dekoj el niaj legantoj povas serioze diri al si, ke ili tion jam faras. Kie restas la aliaj?

**NIA AFERO estas via afero. Kiom da abonantoj vi jam varbis por La Juna Batalanto?**

La tempo estas peza kaj malbona, la mizero estas granda. Sed ni kredas, ke neniu tempo povas esti tiel malbona, ke fortaj, entuziasmaj, oferemaj homoj per celkonscia agado kaj ĝoja konfido al Dio ne povus pliboniĝi ĝin! Kaj la taskoj de la Regno de Dio fariĝas des pli klaraj kaj des pli urĝaj, ju pli la homaro freneziĝas en la preparo de sangaj bataloj.

Kaj al tiu tasko en la speciala formo de nia movado ni restos fidelaj. Ĉu vi helpos?

W. S.

## La Trézoro en la Rejno.

**Jen iam reĝo regis**
**Ĉe l' bela Rejna bord',**
**Al kiu malplaĉegis**
**Disput' kaj malkonkord'.**

**Batalis pro trezoro**
**Ja lia heroar',**
**Kaj preskaŭ pro la oro**
**Pereis la anar'.**

**Li diris al la viroj :**
**« Ĉu servos vin la or',**
**Se dum la militiroj**
**Vi mortos pro l'trezor'?**

**Finiĝu la mizero!**
**En Rejnon ĵetu ĝin!**
**Kuŝadu sub rivero**
**La or' ĝis mondofin'!**

**En Rejnon forĵetata**
**Do estis la trezor',**
**Kaj tute ignorata**
**Nun estas tiu or'. —**

**Forĵetu en riveron**
**Disputobjekton vi.**
**Por ke militinferon**
**Ne povu kaŭzi ĝi!**

**Laŭ germana originalo tradukis**
**Alois NORBERT, Wien.**

## Ĉu ví estas bona patrioto?

Laŭ kutima kredo oni devus honti, esti nomata « nepatriota », — sed multaj kutimaj kredoj estas malveraj.

Se vi supozas, ke la nacio, kiun vi nomas via, estas la ĉefa en la mondo, se vi malracie fanfaronas pri bonaj agoj, kiujn faris ne vi, sed samnacianoj, se vi estas fiera, esti amerikano, anglo, franco, germano ktp., se vi apogas dum milito la kalumniojn, kiujn via registaro propagandas kontraŭ la malamiko, — tiam oni akceptos vin kiel bonan patrioton. Ĉar jen la vero — kutima patriotismo estas nur naciismo.

Naciismo estas bazita sur mensogoj (unu el ili estas estas, ke nacio estas unuo), kaj kredoj naciaj instigas ridojn inter fremduloj. Sed kristanismo ne aprobas malveron, kaj tial naciismo kontraŭas la instruojn de Kristo; al Li proksimulo estis ĉiu persono, kiu bezonas helpon. Tamen ni devas konfesi, ke inter la katolikaro regas forte patriota naciismo, ofte pli forte ol inter la nekristanoj. Kiel tion klarigi? Laŭ mia opinio klarigo troviĝas en la historio : — Tra la centjaroj ĉiam devis batali la Eklezio kontraŭ la ŝtato, kaj por havigi pacon, la katolikoj devis akcepti kompromison, devis permesi, ke « Cezaro » estu pli honorata, ol li meritas; sekve naciismo — kiu elvenas el la ŝtato — estas instruata pli malpli kun la aprobo de eklezioj, kaj oni akceptas ĝin, kvazaŭ ĝi estus kredo religia.

Ekzamenu la patriotismon ĝis la fundo, esploru la naciismon, pripensu la internacian aŭ sennacian bazon de la instruoj de Kristo, kaj poste vi eble fariĝos nebona patrioto laŭ la opinio de viaj samnacianoj.

Vi ne povas servi du kontraŭajn mastrojn. Ĉu vi elektos Veron aŭ naciismon?

John NIBB, Eastbourne.



## La Amerikanaj negroj kaj la Katolikoj.

En Usono el la loĝantaro de 120 milionoj 18 milionoj, t. e. 15 procentoj, estas katolikoj. El la 11.600.000 usonaj negroj nur 204.000, t. e. 1 3/4 procentoj, estas katolikoj. Depost 50 jaroj tiu situacio ne pliboniĝis. Aliflanke la baptistoj posedas el la sama nigra loĝantaro 24 % kaj la metodistoj 12 %. El la 79 universitataj institutoj por nigruloj nur unu estas katolika: la Universitato de Sankta Francisko Xsaverio en New Orleans. En tuta Usono ekzistas nur kvar katolikaj pastroj el la nigra raso...

Ĉu la katolikoj estas senkulpaj je tiu malĝojiga situacio? Bedaŭrinde ne! La bonega libro de Pastro John T. Gillard S. S. J. (The Catholic Church and the American Negro) informas pri tio. Bedaŭrinde ankaŭ inter katolikoj la rasantaŭjuĝoj ekzistas. La iniciato por okupiĝi pri la negroj kaj la fondo de la misia Societo de Sankta Jozefo venis el eksterlando.

Ni pensu pri la ekzemplo de la nigraj pastroj. La unua estas konsakrita en la jaro 1888; de tiu tempo entute 8 usonaj negroj pastriĝis! El tiuj 9 pastroj du estas formitaj en Francujo kaj du en Italujo!

Unu el ili, membro de la Societo por la Afrikaj Misioj de Lyon, trovis sian laboradon en Usono tiel neebla, ke li foriris el sia naskiĝlando, por dediĉi siajn talentojn al Francujo kaj ĝiaj kolonioj. 4 pastroj mortis. Do ankoraŭ estas en Usono kvar. Kaj el ili eĉ ne unu sola povis elekti en la Sudo, kie loĝas la plimulto de la nigra loĝantaro. Ili estas pastroj en la Nordo, kie la kontraŭnegra sento estas multe malpli forta...

Ekzistas katolikaj hospitaloj, kie oni rifuzas akcepti nigrajn pacientojn. Ekzistas katolikaj preĝejoj, kie blankaj katolikoj rifuzas aliron de nigruloj al la komunia tablo, dum kiam komunias blankuloj.

La Federacio de Nigraj Katolikoj en Usono posedas monatan gazeton «The Chronicle» eldonatan de la blanka jesuito Pastro Markoe S. J.. En unu el la lastaj numeroj troviĝas raporto el Washington : « Disigo en la katolikaj preĝejoj kaj neakcepto en katolikajn lernejojn. Ni havas depost 15 monatoj propran lernejon kun 200 infanoj instruataj de 10 Fratinoj. Sed fininte siajn studojn, niaj infanoj ne povas iri al katolikaj duagradaj lernejoj; ili estas devigataj viziti nekatolikajn lernejojn. Post tio denove oni rifuzas al ili eniron al la katolika universitato aŭ al la du fakultatoj... » « La seminarioj de la ĉefeparkio Baltimore rifuzas akcepti nigrajn junulojn, kiuj deziras fari siajn studojn por prepari sin al pastriĝo, kvankam la negroj devas kontribui al la kostoj de tiuj seminarioj... »

Ĉu oni miras post tio, konstatante la disvastiĝon de la komunismo ĉe la nigruloj? Pastro Markoe S. J., direktoro de « The Chronicle », skribas : « Eŭropo estas hodiaŭ minacata per la komunismo, ĉar la evangelio de sociala justeco predikita per Leono XIII-a ne efikiĝis en la industria sistemo dum la 50 jaroj pasintaj depost tiu tempo... Same la nigra raso ne povas esti konvertata tiel longe, ke la misiisto kaj la blanka patrono predikas al ĝi nur la evangelion de la pacienco kaj humileco, ne donante al li la plenan evangelion de Kristo — t. e. tiun gravan parton de la Evangelio, kiu koncernas la socialan kaj ekonomian justecon. En la nunaj cirkonstancoj konvertiĝo al la katolikismo kaj la praktikado de la katolikismo fariĝis fizike neeblaj... »

Teruraj vortoj! Kia kulpigo, kia respondeco! La blanka mondo indigniĝas pri la sociala humiligo de la pariaoj en Hindujo, — kaj jen trabo en ĝia propra okulo, kaj ĝi ŝajnas tute ignori ĝin... Sankta Petro Claver, Sanktaj Martiroj de Uganda, preĝu por ni!

Laŭ « Bulletin des Missions », St. André.

# Krucmilitista Spirito.

(Precipe por mezlernejanoj.)

Pli varmega ol iam estas hodiaŭ la batalo pri ĉiu unuopa homanimo inter la batalantoj de Kristo kaj la kontraŭuloj. Akre disiĝas sin la armeoj: ĉi tie Kristo — tie Antikristo! Plej klare ni vidas la batalon inter lumo kaj mallumo en la misiaj landoj.

Kvankam ni ĉiuj staras en ĉi tiu batalo brave kaj fidele por nia reĝo, tamen ni estas nur malgranda pionira trupo. Ni bezonas kunbatalantojn, kiuj iras kun ni. Ni trovas ilin en la granda plimulto de niaj kunlernantoj, kiuj pro iu kaŭzo ne povis aliĝi al programa katolika organizaĵo.

Depost 16 jaroj la Krucmilito de la Studenta Junularo (MKSTJ) kiel nura samideanaro volas ekkapti en ĉiuj germanlingvaj landoj tiujn lernantojn kaj — tiom, kiom estas eble en nura idekomuneco — prepari ilin por la granda batalo en la mondvasta batalejo de nia Direĝo.

Kiel Krucmilitistoj ni volas per nia preĝado kaj oferado, per nia ekzemplo kaj ĉiama helpopreteco, porti la standardon de Kristo al la venko en la tuta mondo, en la grandurbo, en la nekatolikaj regionoj kaj en misiaj landoj.

Preskaŭ 60.000 Krucmilitistoj laboras kaj batalas por la sama granda ideo, ke Kristo reĝu en ni, ĉirkaŭ ni kaj en la animoj de ĉiuj kunvivantoj. En multaj landoj ili staras sub diversaj nomoj, sed kun samaj sentoj.

Ni kunhelpu realigi la internaciajn celojn de la Krucmilito por la Misioj per nia kunlaboro, uzante la internacian helplingvon Esperanto kiel efika komprenilo en la misioj. Tial katolika Esperanto-junularo venu al la Diregno-Kunveno, kiun la aŭstra kaj germana branĉoj de la Krucmilito organizos en la belega urbo Salzburg de la 2-a ĝis 6-a de aŭgusto!

La « generalo » de la Krucmilito, la ĉiam energie laboranta P. Schütz S. J., prenos la organizon en sian manon kaj donos al ni novajn grandajn impulsojn por nia Diregna laboro. Kaj tio estas al ni ĉiuj tiel necesa hodiaŭ. Ni ja devas ĉiuj fariĝi aktivaj, vidi la mizeron kaj helpi. Li montros al ni, kion ni, unuigitaj en la granda batalo, povos atingi kaj kiel ni instruu kaj preparu por tio nin kaj aliajn.

De kompetentaj spertuloj ni aŭdos pri la nuna stato de la granda spirita batalo en la patrujo kaj en la misioj. Bonaj gramofondiskoj kaj belegaj originalaj filmoj pliprofundigos la aŭditajn aferojn. Ĉiuvespere estos ia misia solenaĵo, ekz. benado de la Kristofajro kaj torĉoprocesio, kiuj ĉiam postlasas profundan impreson.

Krom tio la belega urbo Salzburg, la juvelkesto inter la Alpoj, kaj ĝia proksima ĉirkaŭaĵo donos al ni ĝojajn aventurojn kaj impresojn. Tendaro ebligos gustumi la romantikajn ĉarmojn de la misia vivo.

Mallonge kaj decide: Venu al Salzburg! La kongreso fariĝu nepre tutgranda afero! Katolika Esperanto-junularo, ni ne volas stari en la lasta vico! Venu el la germanaj landoj, venu ĉiuj, kiuj iel povas! Venu el la eksterlando! Reprezentantoj de ĉiuj nacioj estas invitataj! Venu kiel reprezentantoj de la katolika Esperanto-junularo kaj utilu per tio al nia afero, al la katolika Esperanto-movado! Venu al Salzburg! Kristo devas reĝi! Dio volas ĝin!

L.-B., Salzburg, Krucmilitisto kaj MOKA-ano.



# El la historio de la slovaka katolika skolta movado.

Ni represas la interesan artikolon el la Esperanto-Angulo de « Skaut ».

La movado de slovakaj katolikaj skoltoj ekestis depost la 1-a de januaro 1928. Je tiu dato kunvenis la 10 unuaj pioniroj de la vera skolta ideo sub prezido de Pastro J. Lukačovič en la blumentala paroĥejo de la ĉefurbo Bratislava. Granda entuziasmo kaŭzis la organizadon de grupoj kaj trupoj en subtatraj urboj kaj vilaĝoj. Malgraŭ multaj malhelpoj la konatigo kaj klarigado de la bezono de propagando por la skolta ideo, de tiu nuntempa gvidanta kaj reganta homama ideo tiel bezonata en la formado de la estonta generacio, plene sukcesis.

Tiujare formiĝis la Centro de Slovakaj Katolikaj Skoltoj kaj prenis sur sin la taskon de la organizado kaj centrigado de la katolikaj skoltaj grupoj en Slovakujo.

La 23-an de junio 1928 jure fondiĝis la Centro de Slovakaj Katolikaj Skoltoj, gajninte aprobon de la statutoj per la ŝtataj oficejoj. Tuj aliĝis fervoraj laborantoj el la Subtatra Regiono, inter la unuaj Pastro M. Boleček el Nitra kaj junuloj el Vrutky. La laboro komenciĝis.

La SKS-movado ne ŝatis kaj ne ŝatas politikon, ĝi ĝin tute fortenis. Ĝia celo kaj idealo estas laboro interjunula, edukado, farado de homoj laŭ la tutmonda skolta sistemo per amo al ĉiuj. La katolika skolta ideo trovis pionirojn, fervorajn batalantojn, kiuj kuraĝe kontraŭstaris diversajn malfacilaĵojn; kutime la slovaka popolo ne volonte tuj akceptas ian ajn novan ideon. Tio okazis ankaŭ pri la skoltmovado. Sed post kelke da tempo, kiam la ideo montris sin taŭga, la trupoj estiĝis kiel la lagetoj en la pluvo.

La unua jaro de ekzisto 1928 estis propagandjaro; tiujare la Centro SKS aranĝis grandan flosan ekskurson sur la riverego Vah.

En la jaro 1929/30 montriĝis necesega interna laboro, interna fortiĝo. Oni komencis eldoni nian organon « Skaut » (« Skolto ») sub redaktado de nia eminenta gvidanto Pastro J. Hlavaty. Granda ekskurso al Praha okaze de la sanktvenceslaaj festoj kaj granda slovaka skolta tendaro montris la gravecon kaj taŭgecon de la skolta sistemo. La nombro de trupoj kaj unuopuloj kreskis je 100 procentoj.

Nun la movado de la Slovakaj Katolikaj Skoltoj eniris la 5-an jaron de sia ekzisto. Kiel malgranda infano ĝi kreskas de tago al tago; de horo al horo ĝi disvastiĝas kaj fariĝas pli grava en la junula movado, en la vivo de la katolika Slovakujo.

Ne pasis ankoraŭ unu jaro, de kiam ĝi montris sian potencon dum la granda tutslava skolta jamboreo en Praha, kiam ĝi montris sian pretecon, ĉeestante la jamboreon kun unu kvarono de la membraro el la tuta Subtatra regiono.

Nun denove venas solena momento. La slovaka katolika skoltaro manifestas. Laŭ la leĝo la skolto helpas, la skolto servas, tio estas lia sankta devo. Ne sufiĉas zorgi pri si; la skolto devas ankaŭ zorgi pri la proksimuloj. Pro tio la slovakaj katolikaj skoltoj komencis antaŭ unu jaro agadon por konstrui someran hejmon por la slovaka katolika junularo. Ĝis nun la slo-

vaka junularo devis kontentiĝi per diversaj nekatolikaj aŭ eĉ kontraŭkatolikaj tendaroj kaj similaj institucioj, se ĝi volis pasigi la libertempon ekster la urboj en sana, freŝa aero. Certe tio ne estis seninflua. La spirita bono estas la ĉefa afero.

La tiel nomata « Studenta hejmo » en la banloko Beluŝa estas jam finkonstruita. Ĝi kuŝas en belega Vah-regiono, sub la montaro Tatra, kaj de tie oni povas en mallonga tempo atingi belegajn montojn, ruinojn de historiaj kasteloj k. a..

« Studenta hejmo » estos libertempa centro de la slovaka katolika junularo; la celo estas, gvidi kaj eduki la neskoltan junularon laŭ la skolta metodo. Per finkonstruo de la Studenta hejmo la Centro de Slovakaj Katolikaj Skoltoj sub gvidado de sia eminenta ĉefgvidanto frato profesoro J. Lukaĉoviĉ certe plej bone plenumas sian devon. Savi kaj servi la proksimulojn, ne nur materie, sed ankaŭ spirite, estas ja devo de ĉiu skolto.

La Centro SKS festas nun sian kvinjaran jubileon, kaj okaze de ĝi ĝi konstruis indan monumenton, kiun ĝi donacas al la esperplena junularo la 5-an de julio 1932 kun ĉeesto de reprezentantoj de la tuta slovaka junularo. Ni esperu, ke la « Studenta hejmo » plenumos sian grandan mision, kaj estonta historio mencios ĝin kiel gravan fondon.

ALOJZ MACEK, Bratislava.

## Litova Katolika Junularo Jubileas.

9-10 julio 1932, la katolika junulara asocio « Pavasaris » (Printempo) festas sian 20-jaran jubileon. Tra la tuta mondo flugis ĝiaj invitiloj, kaj oni atendas multajn eksterlandajn gastojn.

« Pavasaris » fondiĝis antaŭ la milito en la jaro 1912. La fondinto kaj la vera animo de la asocio, kiu ĉefe organizis kamparanan junularon, estis Pastro Dogelis, kanoniko. En la tempo de la caro kaj de la germana okupo la asocio devis multe labori sekrete, sed post la milito ĝi ricevis fortan entuziasman impulson sub sia prezidanto Prof. J. Eretas, kaj ĝia organizo adaptiĝis al okcidenteŭropaj metodoj.

Nun ĝi havas pli ol 70.000 membrojn, junulojn kaj junulinojn, kun 710 lokaj grupoj (en kvin eparkiaj asocioj kaj 35 distriktaj asocioj), ĝi publikigas du gazetojn : « Pavasaris » (« Printempo ») por la membroj, « Jaunimo Vadas » (« junulara gvidanto ») por la ĉefoj.

La laboro de la asocio dividiĝas en kelkajn branĉojn : publika instruado, sociala agado, ŝparado, gazetaro, agrikulturo ktp.. Sed la ĉefa merito de Pavasaris estis ĉiam la klerigo de la membroj. Ĝi organizis Popolan Universitaton titolitan « Valanĉus », kies 34 sekcioj troviĝas en la diversaj litovaj urboj. La kursoj tie estas gvidataj de profesoroj, pastroj, advokatoj, kuracistoj, studentoj. Pavasaris posedas propran komercan liceon en Kaunas.

La grupoj havas kelkajn orkestrojn kaj pli ol 200 kantosekciojn.

Ĉiu loka grupo troviĝas sub la spirita gvidado de loka pastro.

Kunigante la gejunulojn de la kamparo, por plialtigi ilian intelektan kaj moralan nivelon, la asocio okupiĝas pri ilia klerigo, pri la solvo de la problemoj, kiuj ilin tuŝas, pri la religiaj, socialaj kaj ekonomiaj institucioj, kiuj servas ilin.



La nuna prezidanto estas D-ro J. Leimonas, la ĉefsekretario estas M. K. Balkunas. Pavasaris estas la plej granda asocio en la tuta lando, kion oni facile komprenas, se oni pripensas, ke tuta Litovujo nun havas nur iom pli ol du milionojn da enloĝantoj.

La kongreso fariĝos grandioza demonstracio de la katolika litova junularo. Partoprenos ankaŭ litova junularo el la distrikto de Vilnius (Wilno, nun pola) kaj el Latvujo, kaj oni atendas grandan delegitaron el Usono, kie vigle laboras la katolika litova unuiĝo « Vyĉiai ».

Okazos sporta Olimpiado kaj granda festo de « dainos », famkonataj litovaj popolkantoj, kie 4.000 personoj partoprenos. Ekspozicio montros la vivadon kaj agadon de Pavasaris. La ĉefepiskopo de Kaunas celebros solenan meson, dum kiu estos kantataj popolkantoj, sur la ĉefplaco Rotuŝe... La plej impresa kaj solena momento estos la ĵuro de la membroj : « Ni, litova katolika junularo Pavasaris, danke memorante antaŭ la Dia Providenco la 20-jaran jubileon de nia asocio, promesas publike kaj solene, fervore servi dum nia tuta vivo Dion kaj patrolandon, dediĉi ĉiujn niajn fortojn al la realigo de tiu celo. Dio helpu nin! Amen. »

D-ro J. LEIMONAS, Kaŭnas.

## JAPANUJO EN DANĜERO.

Interesan bildon pri la interna situacio de Japanujo donas artikolo de *D-ro Warnshuis* en la aprila numero de «The International Review of Missions». Li diras i. a. :

La eksterlandano ĝenerale vidas en Japanujo la plej bone organizitan ŝtaton de la nuntempa Azio. Li tion motivas per la fakto, ke ĝi havas fortan registaron, kiu scias gardi la publikan ordon, ke ĝi posedas eduksistemon efikantan por la tuta nacio kaj ke ĝi havas loĝantaron rase unuecan. Tiel Japanujo ŝajnas rimarkinde diferenci de siaj najbaraj landoj Ĥinujo kaj Hindujo. Tamen en realeco ĝi eble estas eĉ pli disŝirita ol tiuj, ĉar da laika karaktero de la japana instrusistemo detruis la religian kredoforton de la popolo kaj edukis vastan kleran, sed senlaboran klason daŭre kreskantan. La malfacila ekonomia situacio ĉie pelas la kamparanojn, kiuj reprezentas preskaŭ la duonon de la loĝantaro, ke ili formigras de siaj vilaĝoj. Per tio la familia vivo kompreneble detruiĝas. La japana literaturo, precipe la ĉiutagaj ĵurnaloj, disvastigas multajn radio-informojn kaj eksterlandajn ideojn. La maltrankvileco posedanta la landon ne nur efikas al unu alte evoluinta klaso, kiu volas vigligi nesciantan, malprogreseman popolamason, sed kontraŭe ĉiujn individuojn, ĉar ĉiuj lernis legi kaj estis entirataj en la komunan ekonomian batalon. Unuflanke la popolanimo estas serioze minacata per la presita vorto kaj revolucia, pure materialista mondkoncepto, kiu estas lerte propagandita de ruzaj agentoj. Aliflanke la registaro faras grandegajn klopodojn, por reteni tiun ondon. Sed krimoj, memmortigoj kaj seksaj ekscesoj timige kreskas. Sole en la lastaj monatoj kvindek libroj pri la marksismo estas nove eldonitaj, kaj la metodoj, por eviti naskon de infanoj, terure disvastiĝas. Du ŝtatministroj kaj unu Generalguvernoro atendas juĝejan kondamnon pro subaĉeto. Kaj malespero kreskas en la tuta popolo...

# Salado.

**Bestprotekto.** — Antaŭ nelonge okazis internacia kongreso de ĉasistoj. Delegitoj el 32 landoj diskutis pri la protekto de la alko, ĉar tiu cervo estas minacata de pereo. Kiel la jurnaloj raportis, ĉiuj estis tute unuanimaj pri la metodoj uzotaj por la protekto. — Bedaŭrinde por la protekto de la homoj kontraŭ pereo en la venonta milito tia unuanimeco ankoraŭ ne realiĝis.

**Princo Faisal.** — Princo Faisal el Mekka vizitis Eŭropon. En Berlin li promenis kun granda intereso tra la zoologia ĝardeno, por tie vidi, unuafoje en sia vivo, multajn bestojn de sia hejmlando. — Jes, Eŭropo kolektis milojn da bestoj. Nur la kolombon kun la olivbranĉo oni ankoraŭ vane atendas. Ĝis nun ĝi nur ekzistas sur la svisaj poŝtmarkoj.

**Bagateloj.** — En la Londona jurnalo « Times » iu sinjoro antaŭ nelonge plendis pri la maljusteco de la fervojtarifoj : Dikaj kaj pezaj personoj pagas ekzakte la saman sumon por sia bileto kiel maldikaj kaj malpezaj ; tamen la laboro por la lokomotivo, la foruzo de la vagonoj ktp. estas tre malsamaj. — Tiu sinjoro estas prava. Ni rekomendas, sendi lin al Genève. Tie ankoraŭ kelkaj bagatelaĵoj rilate justecon estas ŝanĝindaj.

**Kial la koko krias.** — Kiam knabeto venas en la ĝustan aĝon, tiam la demandado neniam ĉesas. Ĉion li dezirus scii. « Aŭdu, patro, kial do krias la koko? » — « Vidu, » klarigas la patro, « la koko krias ĉiufoje, kiam homo mensogas ». — « Jes, sed kial do, patro? » — « Vi do scias el la Sankta Biblio, ke la koko kriis, kiam Petro malkonfesis sian Sinjoron kaj Majstron, ĉu ne? Kaj de tiu tempo tio okazas. » — La knabeto pripensadas. « Sed, patro, la koko ja krias ĉiam tute frue en la mateno. Tiam do ĉiuj homoj ankoraŭ estas dormantaj. » — « Je tiu tempo, mia filo, la jurnaloj estas presataj... »

**Hodiaŭa Aŭstrujo.** — Eksterlandano vizitis la belan urbon Wien. Ĉie li rimarkis bandojn da homoj en uniformo. Li demandis amikon : « Kiel do oni povas vidi, kiuj el tiuj homoj estas la « ruĝuloj » el la respublikana protektligo kaj kiuj estas la Heimwehr-anoj (membroj de la burĝa memprotekto)? » — « Tion mi ne povas diri al vi, sed ekzistas bona metodo, por ekscii ĝin. Se vi nun laŭte krias « Vivu la respubliko! », vi rimarkos diferencon. Se ili konsente kriaĉos, ili estas ruĝuloj, se ili mortbatas vin, ili estas Heimwehr-anoj, kaj se ili silente pluiras, ili apartenas al la ŝtata armeo... »

**Malarmada Konferenco.** — Se bierfaristoj kaj vendistoj de brando diskutus pri malpermeso de alkoholo aŭ se buĉistoj estus invitataj esprimi sian opinion pri vegetarismo, tio estus ekzakte la sama afero kiel en Genève la disputado de generaloj kaj admiraloj, kiujn la registaroj tien sendis kiel kompetentajn ekspertojn pri malarmado.

**Miskompreno.** — En publika kunveno kun ĉeestantoj de ĉiuj tendencoj unu frazo (la parolanto prelegis en franca lingvo) trovis ĝeneralan aplaŭdon. Unuj estis komprenintaj : « Il nous faut désarmer » (« Ni devas malarmi »), aliaj : « Il nous faut des armées » (« Ni bezonas armeojn »).

**La bovoj.** — Aro da bovoj estis pelata al la buĉejo. Unu proponis, ke oni rifuzu tien iri kaj ke oni per ĉiuj fortoj komune rezistu. Sed la aliaj indigniĝis, dirante : unue, ke tio estas la plej honora morto por bovo, due, ke ne estas tute certe, ke ĉiuj el ili mortos, trie, ke la afero ĉiam estis tia kaj ĉiam restos tia. Kaj oni nomis la junan bovon bolŝevisto.

LOLA.

---

**LA DUAN NUMERON de la nova jarkolekto vi ricevis. Kaj vi ankoraŭ ne pagis la abonon? Hontu! Sendu tuj vian abonkotizon, ni bezonas ĝin!**



# Nia Movado.

### Internacia Oficejo.

**Ni atentigas** pri la nova franclingva broŝuro de nia ĉefsekretario « Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique », kiu estas 40-paĝa kaj kostas 2 fr. fr. (0.35 RM). Mendoj el Francujo iru al la franca MOKA-sekretario, el aliaj landoj al la internacia oficejo.

**Ni perdis** per la ekonomia krizo pli grandan nombron da pagantaj abonantoj, ol ni estis pensintaj. Feliĉe ja ankaŭ venis multnombraj novabonoj. Tamen ilia nombro devas fariĝi pli granda. Helpu, varbu!

### Aŭstrujo.

**Landeck (Tirolo).** En julio okazos parolado de la ĉefsekretario de MOKA

**Oetz.** En la Amerikana Popola Universitato en Eŭropo, kiu funkcias en ĉi tiu Tirola loko, okazos 11-22 julio prelegoj de D-ro W. Solzbacher pri junulara movado kaj malarmado.

**Salzburg.** La Kristreĝa Kunveno en Salzburg (2-6 aŭgusto 1932) promesas fariĝi tre sukcesa. La katolikaj Esperantistoj de Salzburg decidis, ke ankaŭ la Esperanto-junularo partoprenu tiun kunvenon de la Krucmilito de Studenta Junularo por la Misioj. Se sufiĉe granda aro da Esperantistoj kunvenos, ni marŝos en aparta grupo kun Esperanto-flagrubandoj kaj standardoj. Parolados la estinta nacia sekretario de MOKA **Fr. Anselm Schwab OSB** pri Esperanta temo. Venu multnombre! Volonte ni vidus reprezentantojn el plejeble multaj nacioj kaj landoj. Kompreneble estas ebleco, paroli Esperante. Demandojn respondas kaj aliĝojn akceptas la sekretario de la katolika Esperanto-grupo «Estonteco», Leop. Bauer, Borromaeum, Salzburg-Parsch. Vidu la noton en la lasta numero de J. B. kaj la artikolon en ĉi tiu numero! Kristo devas reĝi! Dio volas ĝin! « Estonteco », Salzburg.

**Wien.** La Esperanto-kunveno de ĉeĥa « **Orel** » dum pentekosto okazis sub prezido de s-ano Varejka, plej interesaj estis la popoldancoj kun kantoj prezentitaj en vere plaĉa maniero de la katolikaj geskoltoj Esperantistaj venintaj el Bratislava sub gvido de nia amiko Alojz Macek. Niaj geamikoj Mudrak, Jakob, Lippert kaj Kolar gvidis ilin dum du tagoj tra Wien. —

— **Katolika Unuiĝo Esperantista** (KUE) aranĝis la 5 junio ekskurson al « Schneeberg » (« neĝmonto »). En la Elizabet-preĝejo sur ĝi (1.000 metrojn alta) okazis sankta meso kun prediko, en Esperanto oni kantis « Al kiu mi min turnu... » (de Schubert), partoprenis 50 personoj. La gazeto « **Informoj** » (organo de KUE) bedaŭrinde ne plu aperas pro la krizo. Ni deziras al tiu simpatia kolegino baldaŭan reviviĝon! — La **Ĉe-metodaj Esperanto-kursoj** gviditaj de gesinjoroj Morariu finiĝis post dumonata sukcesa daŭro. La 10 junio okazis fina festo kun 500 ĉeestantoj, paroladis kaj deklamis ankaŭ la lernintoj mem, i. a. 10-jara knabo. S-ano Hovorka prezentis memverkitan profundtuŝantan poemon, kvazaŭ daŭrigon de « La Vojo » kun tendenco kontraŭmilita, porpaca. Niaj geamikoj klopodas, varbi el la lernintoj kelkajn por MOKA.

**Nacia sekretario** Walter Mudrak sendis nome de MOKA salutleteron al Kongreso de la Katolika Junularo (« Reichsbund ») en Eisenstadt kun nova atentigo pri Esperanto, li publikigis raportojn pri la Krucmilito de Eŭropa Junularo en gazeto « Berichte » kaj en « Aŭstria Esperantisto ».

### Belgujo.

« La Source » (« La Fonto »), gazeto eldonata de nia amiko Emile Schwartz, bonvolis atentigi pri nia movado.

### Ĉeĥoslovakujo.

Du gazetoj de la katolika junularo enhavas regulan Esperanto-Angulon. « **Jitro** » (« Mateno ») estas organo de ĉeĥaj studentoj, kaj « **Skaut** » (« Skolto ») de slovakaj skoltoj. La rubrikon en « Skaut » redaktas A. Macek. La lasta numero eĉ enhavis poemeton de nia aŭstra amiko Mudrak kun atentigo pri « La Juna Batalanto ». — Ankaŭ « **Novy Narod** » (« Nova popolo ») enhavas kelkfoje rubrikon (« Učte se Esperanto ») redaktatan de J. Filip.

**Bratislava.** A. Macek gvidas du Esperanto-kursojn por katolikaj skoltoj kaj skoltinoj.

### Francujo.

**La nacia sekretario** (Prof. P. J. A. Muffang, 14bis av. Galois, Bourg-la-Reine, Seine) sendas por 20 frankoj : lernolibron, serion da kuponoj donantaj rajton al korekto de ekzercajoj, vortareton (ŝlosilon), libreton en Esperanto, broŝuron franclingvan pri MOKA kaj internacia katolika junulara agado, jarabonon al La Juna Batalanto. Diskonigu kaj propagandu tiun proponon inter interesitaj geamikoj!

« **Les Documents de la Vie Intellectuelle** », grava revuo eldonata de la francaj dominikanoj, enhavis en junio 40-paĝan artikolon de la ĉefsekretario de MOKA pri la Internaciaj Asocioj de la Katolika Junularo. Speciale la MOKA-movado kaj niaj ideoj pri la internacia laboro estas detale pritraktataj. Tiu artikolo estas ankaŭ eldonita kiel aparta broŝuro.

### Germanujo.

**La nacia sekretario** (H. Kolvenbach, Düsseldorf, Stoffeln 23) eldonis raporton pri la epoko de la 1 januaro 1931 ĝis la 31 marto 1932. Jen kelkaj detaloj : la sekretario partoprenis je 60 kunvenoj lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj, faris stud- kaj propagandvojaĝojn en Rejnlando, Suda Germanujo, Saar-Regiono, Belgujo, Nederlando, Francujo, faris 15 paroladojn en Düsseldorf, Paris, Elzaso, Hilden, Neuss, Mainz, donis ĉ. 1500 informojn pri literaturo, internaciaj aferoj ktp., faris 5 specialajn propagandagadojn pri malarmado (majo, junio, oktobro, novembro, januaro), kiuj atingis 427 lokojn, 4.000 personojn. Entute la agado de la nacia sekretariejo atingis 433 lokojn kaj 6.150 personojn, 11.400 ekzempleroj de varbiloj, cirkuleroj ktp. estas disdonitaj kaj dissenditaj. La gazetara servo atingis 200 gazetojn kaj ĵurnalojn. Entute la germana sekretariejo estis en rektaj rilatoj kun Nederlando, Anglujo, Belgujo, Luksemburgo, Francujo, Svisujo, Portugalujo, Polujo, Nordameriko kaj Sudameriko, ĝi kunlaboris kun multaj aliaj organizajoj. — Rilate la organizon MOKA estas reprezentita en ĉ. 100 lokoj, la delegitoj kaj kunlaborantoj agadas sub propra respondeco. La kunlaboro estas nesufiĉa. Delegitoj laboras tro malrapide, iliaj kapablecoj kelkfoje ne sufiĉas. La mono enspezita apenaŭ sufiĉis por pagi materialon kaj afrankon, kotizojn al la internacia sekretariejo de MOKA kaj al la Katolika Junularo de Germanujo (al kiu la germana MOKA-asocio estas aliĝinta), ĉiujn aliajn kostojn devis pagi la sekretario persone. En la sekretariejo kunlaboris por kelka tempo samideanoj Thoonen, Bachem, Engeln, samideaninoj Reikowski, Rudloff; reprezentantino en Berlin estis Gertrud Odenthal. — Interesitaj kunlaborantoj postulu la plenan raporton germanlingvan!

**Bochum.** En la Katolika Junmetiista Unuiĝo okazas Esperanto-kurso sub gvido de apotekisto Stein. Loka unuiĝa gazeto regule atentigas pri ĝi.

**Düren.** MOKA-grupo preparas internacian limkunvenon por la 4 septembro en Nideggen.

**Düsseldorf.** Pestalozzi-Lernejo de MOKA havis en sia 11-a laborjaro somere 5 kaj vintre 7 kursojn kaj klubojn (Angla lingvo, franca lingvo, Esperanto, politiko) kun 75 partoprenantoj. Oni peradis al la membroj eksterlandan korespondadon.



**Essen.** MOKA-grupo reprenis la eldonadon de la « Bulteno de la MOKA-grupo Essen », oni volas fari el tiu loka bulteno regionan informilon. Ĝi plejgrandparte estas redaktata en Esperanto. Ĉiulunde okazas kunveno aŭ ekskurso kun Esperanto-babilado. La grupo posedas Esperanto-bibliotekon kun 200 volumoj. Oni preparas regionan kunvenon por la 24 julio.

**Gotha.** Nia amiko Kurt Döbler eldonas cirkuleron de la pli maljunaj anoj de la katolika junulmovado de Turingio, kiu ankaŭ okazigas regulajn regionajn kunvenojn. Li ofte atentigis pri la paca movado kaj pri MOKA.

**Mainz.** Franca-germana junulara kunveno okazis. La nacia sekretario de MOKA faris unu el la ĉefparoladoj.

**Gazetoj de la katolika junularo.** « **Wacht** » (« Gardo »), ĉeforgano de la Katolika Junvira Asocio, enhavis en junio tutpaĝan artikolon pri Esperanto de R. Seebacher (Dortmund), « **Kolpingsblatt** » en speciala varbnumero atentigis pri la Esperanto-grupoj de la Junmetiista Unuiĝo.

### Hispanujo.

**Gijon.** « El Principado », gazeto de la Katolika Agado kaj de la katolika junularo, kiu en imitinda maniero enhavas regulan Esperanto-rubrikon, bonvolis atentigi pri La Juna Batalanto kaj ĝia publikiĝo de alvoko de la Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malarmado.

### Svisujo.

**La nacia sekretario** (Eugen Vogt, S. K. J. V., Zug) raportas pri bonaj sukcesoj. La 23 julio okazos en Luzern la unua landa konferenco de MOKA kun elekto de provizora komitato. La ĝisnunaj delegitoj kunlaboras, kaj la du katolikaj pacgrupoj « Pro Pace » en Basel kaj Zürich promesis partoprenon. La internacia sekretario de MOKA kredeble povos partopreni la kunvenon en Luzern.

**Olten.** La 23 junio okazis kunveno kun parolado de nia delegito W. Guldimann pri MOKA. 30 ĉeestantoj.

---

# Praktikaj rimarkoj.

« **La Praktiko** » nomiĝas la monata, riĉe ilustrita gazeto de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto. Pastro Cseh mem ĝin redaktas, kaj tio jam garantias por bona kvalito. La celo de la gazeto estas, servi la komencantojn, kiuj deziras pliperfektiĝi en la uzado de Esperanto. La sola malbona kvalito de la gazeto estas ĝia prezo (unu dolaro), kiu ja ne estas tro alta rilate al la boneco kaj luksa aranĝo de la gazeto, sed nepre tro alta rilate al la malplenaj poŝoj de multaj junaj Esperantistoj. Nun la Cseh-instituto informas nin, ke grandanima samideanino donacis al ĝi 200 dolarojn, por ebligi tutjuran liveradon de « La Praktiko » al 400 malriĉuloj je duona prezo. La Instituto mem decidis pagi por 100 pluaj malriĉuloj, do 500 gesamideanoj povas ricevi por tuta jaro la gazeton por duona prezo. Ili devas sendi laŭeble tuj la prezon en poŝtmarkoj de sia lando, nome 10 poŝtmarkojn valorajn por letero al eksterlando, al la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan 32, **Den Haag**, Nederlando.

**La Internacia Esperanto-Muzeo Wien,** kies sidejo troviĝas en la iama imperiestra palaco kaj kiu estas administrata de nia kompetenta kaj simpatia samideano, Registara Konsilanto **Hugo Steiner**, eldonis interesan prospekton kaj preparas eldonon de jarlibro. La Muzeo bezonas ankoraŭ membrojn, kiuj pagas 12.50 svisajn' frankojn (por tuta vivo) kaj donacantojn, kiuj donacas materialon (librojn, dokumentojn ktp.). Seriozaj interesuloj skribu al IEMW, WIEN I., Neue Hofburg, Heldenplatz.

# Regiona kunveno de katolikaj esperantistoj.

en **Essen** (Germ.). dimanĉon la 24 julio 1932, monaĥinejo «Haus Nazareth», Beethovenstr. 15, (8 minutoj de la ĉefstacidomo).

8.30 h. Missa recitata kun Esperanto-prediko (kapelo en domo),
9.30 h. komuna matenmanĝo,
10.— h. 1-a kunsido : **La organiza problemo en la katolika, Esperanto-laboro** (raportoj : Klein (IKUE), Merse (MOKA), diskutado). (MOKA), diskutado).
11.30 h. Parolado de D-ro Solzbacher : **La problemo de helplingvo kiel katolika tasko.**
13.— h. komuna tagmanĝo,
14.— h. 2-a kunsido : **Esperanto en la instruado** (Peter Klein), praktikaj ekzercoj,
15.— h. daŭrigo : **Kantado en Esperanto**, gvidata de Franz Mies
16.30 h. komuna kafotrinkado,
17.— h. 3-a kunsido : **Esperanto kaj pastraro** (Pastro Klein), **Esperanto kaj instruistoj** (Instruisto Breilmann) **Esperanto kaj junularo** (R. Seebacher).

Dum la kunveno kelkaj salonoj kaj la ĝardeno estas je la dispono de la partoprenantoj. Partopreno senpaga. Tiuj, kiuj intencas ĉeesti la komunajn manĝojn, pagu kotizon de 2.50 RM al poŝtĉeka konto Essen 9040 (P. H. Klein, Essen). Oni atendas ankaŭ la komencantojn. Partopreno de eksterlandaj gesamideanoj estas ebla.

La invitanta komitato Altenberg, Justizrat (Essen); Brenken, profesoro (Bochum); P. H. Klein (Essen); Sasella, profesoro (Krefeld), R. Seebacher (Dortmund); D-ro Solzbacher (Köln); Strauch (Bottrop).

## FAMILIAJ INFORMOJ.

### MORTO.

**D-ro Gertrud Adrian** +. Oni sciigas al ni la morton de D-ro Gertrud Adrian en Buer, membro de MOKA kaj membro de la Eldona Kooperativo La Juna Batalanto. Ŝi estis ĉiam afabla kaj fidela kunlaborantino. Ŝi estis la unua, kiu paroladis pri MOKA per radio. Tion ŝi faris en la jaro 1925 en la Esperanto-kurso, kiun ŝi gvidis ĉe la sendstacio Münster. 1929 ŝi apartenis al tiuj gefideluloj, kiuj fondis la kooperativan societon La Juna Batalanto, por sendepende eldoni nian karan gazeton. Ŝi mortis juna. R. I. P.

### Naskiĝoj.

**Al Ges-roj Lackner** en Wien naskiĝis la 1 aprilo filineto Anna.
**Al Ges-roj Solzbacher** en Köln naskiĝis je la Festo de la Sankta Triunuo (dimanĉo post Pentekosto) filineto Josefa.

**VIAJN ESPERANTO-LIBROJN vi aĉetas ĉe la eldonejo La Juna Batalanto. Ni estas la sola loko en la mondo, kie oni povas havigi al si ĉiujn katolikajn Esperanto-librojn.**

# Internacia Junulara Tendaro 1932.

**Loko** : Malgranda « internacia » insulo en Flensburga Fjordo. Dana terpeco posedata de germana sinjorino kaj donita al junuloj el multaj landoj por ke ili havu tendarejon. Ĝia nomo : Lille Oxeö (t. e. « malgranda bovinsulo »). Sur ĝi oni povas trovi ĉion, kion homo povas postuli : grandan, bonarangitan domon, malnovan fabelan ĝardenon kun vastaj herbotapiŝoj sub muskokovritaj, maljunaj pomarboj, ruinojn kaj malnovajn ŝtonbarilojn, krutajn deklivojn arbarajn kaj fine — sed ne malplej grave — platan sablan marbordon, bonegan por banado en akvo kaj suno. Remboaton, per kiu oni povas plaŭdi trans la fjordon kaj interkomunikiĝi kun aliaj homoj. Vastan perspektivon al la urbo Flensburgo kaj al la marbordoj ĉe la fjordo.

**Partoprenontoj** : Tiu insulo estas malfermata por ĉiu junulo kaj junpensanto, kiu

**Celo** : volas provi akiri klarecon pri la problemoj internaj kaj eksteraj, al kiuj la nova generacio devas koncepti, kaj kiu kredas, ke la homoj per unuiĝo de siaj voloj kaj fortoj povas krei novan kaj pli justan mondordon.

**Programo** : En tiuj ĉi tagoj ni devas proksimiĝi al tiu celo : 1) per kunigo de la junuloj en sanan naturan kaj helpeman kamaradecon sub la simplaj formoj de tendara vivo; 2) per paroladoj kaj diskutoj pri aktualaj temoj atingi novan, pli klaran koncepton, 3) per migradoj, kantado, muziko kaj vesper-kunvenoj ĉirkaŭ komuna fajro doni ne nur momentan travivajon, sed vivenhavon.

**La Konferenco**, kiun samtempe kun la tendaro okazigas la internacie organizita junularo de la militkontraŭuloj, kunigos la partoprenantojn el multaj landoj por diskuti, kion oni povas fari por forjeti la jugon de la militarismo kaj atingi komprenon kaj fratecon. Al la konferenco estas invitataj ĉiuj partoprenontoj en la tendaro.

**Praktikaj informoj.**

TEMPO : 25 Julio — 3 Aŭgusto.

LOKO : Lille Oxeo en Flensburga Fjordo. Oportuna vaporŝipa komunikiĝo de Flensburg kaj Sonderburg al la ŝipalvenejo Sonderhav.

PREZO : (Por la tuta tendaro kaj konferenco) 10 tagoj · 20 kronoj danaj.

Por la tendaro : 7 tagoj ; 15 kronoj danaj.

Por apartaj tagoj : 2,50 kronoj danaj.

Aliĝante oni pagas 2 kr. Oni disponigis 10 duone senpagajn partoprenojn po 10 kr. kaj 7 po 7,50 kr. Peton pri tio oni sendu al la tendara komitato de I. J. L., adreso : B. Kjaerulff Nielsen, Bakkehus, Herlov, Danujo.

KION ONI TROVOS : Litkovriloj aŭ pajlmatracoj, dormejo en tendo aŭ domo.

KION ONI KUNPORTOS : Praktika tendara ekipaĵo (tendara kaj bana vestaĵoj) littukujo, telero, pokalo kaj manĝiloj, se eble kantaroj kaj muzikiloj.

# Anoncetoj.

**Anoncetoj**, speciale pri korespondado, kostas 0.50 RM. ĝis 20 vortoj.

**Haus Lindenhof**, Jugenheim bei Darmstadt, Germanujo, ŝatata aerkuracloko, dieto, frukto- kaj fruktsukokuracoj, gvidado tra centrarejnaj arboj kaj centragermanaj regionoj, instruado pri germana lingvo al eksterlandanoj, granda biblioteko en la domo, naĝbanejo apud la domo, arbaroj kaj montoj, teatroj, muzeoj en proksima Darmstadt (ĉiuhora aŭtobuso).

**Litovujo.** Mi volas korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun legantoj de La Juna Batalanto. V. Rakauskas, Videniškiu p. ag. Varniškiai.

**Nederlando.** Kun katolikaj gejunuloj, speciale fraŭlinoj, korespondas 22-jara katolika nederlandano en Esperanta, flandra aŭ germana lingvoj. Specialaj interesoj : botaniko, paco, militservrifuzo, ekonomio ktp. Gerardo van der Veen, Benterweg 28, DALEN.

**Poŝtmarkojn** deziras interŝanĝi nur kun samideanoj en aliaj kontinentoj, nepre tuj respondos Steiner, prezidanto de Internacia Esperanto-Muzeo. Wien, I., Neue Burg, Heldenplatz, Aŭstrujo.

**Partoprenontoj** de la Katolika Esperanto-Kongreso en Lourdes devas posedi la du librojn pri Lourdes, kiuj ekzistas en Esperanto : « Lando de Mirakloj » kaj « La Hipotezoj pri Lourdes ». Vi ricevas ambaŭ librojn kune por 0.90 RM. (inkl. afranko). Eldonejo La Juna Batalanto, Köln-Dellbrück.

## KATOLIKA ESPERANTO-LITERATURO JE MALALTIGITAJ PREZOJ.

| | |
|---|---|
| **Reinke**, Naturscienco, Mondkoncepto, Religio, famkonata verko, 164 grandformataj paĝoj | 1.— RM. |
| **Ms-ro de Ségur**, Respondoj al Kontraŭreligiaj Paroloj, grava apologetika verko, 224 paĝoj | 1.50 RM. |
| **M. v. d. Hagen, S. J.** Kie estas la Eklezio de Kristo? Interesa respondaro al demandoj de katolikoj kaj nekatolikoj, 172 pĝ. | 1.60 RM. |
| **La Floretoj de Sankta Francisko**, 176 paĝoj | 1.50 RM. |
| **Thomas a Kempis**, Imitado de Kristo, I-a Libro, 108 paĝoj | 0.50 RM. |
| **K. Tauchmann**, Garboj (legolibro), 100 paĝoj | 0.60 RM. |
| **H. Sappl**, Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan grupon? Praktika, rekomendinda verko, 32 paĝoj | 0.25 RM. |
| **Carolfi**, Mallonga Biografio de Sankta Francisko, 64 paĝoj | 0.50 RM. |
| **Carolfi**, **Preĝareto**, 48 paĝoj | 0.50 RM. |
| **Katolika Preĝareto en Esperanto**, 32 paĝoj, luksa eldono | 0.50 RM. |
| **Sauren**, **Migrukunmi** ,Preĝlibro 336-paĝa, bindita | 1.45 RM. |
| **Spirita Juvelaro**, Preĝlibro 292-paĝa, bindita | 2.00 RM. |
| **Litova Almanako**, 288 paĝa | 1.50 RM. |

**Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück.**